

SALUTOJ – NIAJ SOVETAJ GEAMIKOJ!

Proksimiĝas la plej granda tago de Sovetunio – la tago de Oktobra revolucio. Tiuokaze niaj popoloj en Ĉeĥoslovakio kun amo rememoras siajn gefratojn en la granda soveta lando.

Kaj ni – esperantistoj de la plej granda ĉeĥoslovaka klubo – ni sendas al ĉiuj partoprenantoj de la renaskiĝanta movado niajn plej sincerajn bondezirojn kaj sentojn de varma amikeco. De tago alt ago atingas nin sciigoj pri ĝojigaj agoj de diversaj sovetaj esperantistoj. Sovetunia asocio, fondata sekcio de MEM, kursoj, ĉi ĉio estas fonto de nia ĝojo. Konstato, ke tiel porpacaj forte kreskas, donas al ni novajn fortojn kaj energion. Same ĝojaj novaĵoj dum la lastaj monatoj venas el ceteraj proksimaj kaj malproksimaj landoj de popoldemokratioj. Renaskiĝas grandskale nia porpaca movado. Venas potenca forto vokanta ĉiujn sincerajn homojn de la mondo:
„Eternan pacon en unu rondo familia!“

Karel P R O C H Á Z K A 75-jara.

Antaŭ 75 jaroj, la 2-an de oktobro 1880, naskiĝis en Havlíčkův Brod nia malnova membro Karel Procházka, esperantisto aktiva ekde la unuaj jaroj de nuna jarcento. Tiam li estis unu el la gravaj laborantoj en la ĉeĥa Esperanto-movado, komitatano de nia klubo kaj de la Bohema Unio Esperantista. Kun E. Kühnl li verkis grandan ĉeĥan-esperantan vortaron, kun Vl. Tobek tradukis la „Avineton“ ĉefverkon de Božena Němcová. Kiam pasis la mondmilito, li aperis tuj denove kaj helpis krei la tiaman Ĉeĥoslovakian Asocion Esperantistan, kaj fariĝis komitatano de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Instituto. Samideano Procházka sciigis gajni koron de ĉiu, kun kiu li rilatis kaj tial la 1-an de oktobro pensis pri li liaj sennombraj amikoj kun amo.

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenadas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkách 26 je la 20a horo.

Programo:

19. 10. Ota Ginz: La unuaj libroj en Esperanto.
26. 10. Jaroslav Mařík: Prelegserio „Resuma historio de Esperanto“ – Ila parto.
 2. 11. Miloš Rudolf /Olomouc/: Eskpedicio Kon-Tiki.
 9. 11. Julie Bendová: Porpaca laboro de esperantistaj virinoj.
16. 11. Dro Stan. Kamarýt /Chotěboř/: Komenský, protagonisto de pacdefendantoj.
23. 11. Rudolf Burda /Plzeň/: MEM venkas ĉiujn barojn. La internacia situacio.
27. 11. Nikolaa vespereto de la Junularo en palaco Fénix
28. 11. je la 9a horo: Regiona konferenco de Esperanto-Junularo. /Vidu apartan paĝon de la Junularo!/
 30. 11. Ota Ginz: La plej nova esperanta literaturo.
 7. 12. Jaroslav Mařík: „Resuma historio de Esperanto“ – IIIa parto.
14. 12. 96 jaroj de nia Majstro: Solena artvespero de la Verda Ĉaro de Julio Baghy en la salono Malá scéna je la 19,30 horo.
21. 12. Libera tribuno de niaj membroj.
28. 12. Klubaj, ŝtataj kaj internaciaj sukcesoj de Esperanto – Jos. Víték

- - -

POEZIO KIEL FAKTORO EN LA POLITIKA VIVO.

Pri tiu temo parolis en Apeldoorn /distrikto Gelderland/ en Nederlando J. Ph. Punt el Utrecht. Li pritraktis la estron kaj influon de la verko „La Bapto de Caro Vladimir“ de Karel Havlíček Borovský. /Laŭ Laborista Esperantisto, Amsterdam, aŭgusto 1955./

- -

ESPERANTO EN ĈEĤA GAZETO. En nro 6/1955 de la bela geografia revue LIDÉ A ZEMĚ en artikolo pri Jan Welzl, la ĉeĥa vojaĝanto tra fora Nora, estas mencio, ke lia verko „Tridek jaro jen Ora Nordo“ aperis ankaŭ en Esperanto. En la samo nro /artikolo „En Ĉielaj monto“/ oni parolas pri organizo, portanta la esperantlingvan nomon „Interhelpo“. Estis ĉeĥaj laboristoj, kiuj antaŭ jaroj helpis konstrui industrion en soveta Kirgizio. Ni estos dankaj al niaj legantoj, kiuj povos al ni doni detalajn indikojn pri tiu organizo, kiun evidence partoprenis esperantistoj.

- -

PRI „VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY“ aperis artikoleto en la budapesta film- kaj teatro-revuo SZINHÁZ ÉS MOZI nro 35/1955. Verkis ĝin s-ano Csáder el Bratislava.

- -

SINJORO TADEO EN NOVA ELDONO. Nun ni ricevis konfirmon de pola eldonejo laŭ kiu ni povas informi niajn legantojn, ke nova eldono de „Sinjoro Tadeo“ de Adam Mickiewicz en traduko de Antoni Grabowski aperos en nuna jarfino. Ni ricevos sufiĉan kvanton por disponigo al interesuloj. La prezon ni ne povas diri ankoraŭ. Ĝin fiksos la ĉeĥoslovaka importkompanio..

- -

ESPERANTO-RONDETO EN LOMONOSOV-UNVIERSITATO. Mila Bokareva, studentino de la Lomonosov-universitato en Moskva, informas la Bultenon de la Bulgara Esperantista Asocio, ke estos organista dum nuna aŭtuno Esperanto-rondeto en tiu universitato.

- -

ANDERSEN KAJ ESPERANTO. La fama dano H. C. Andersen rakontadis siajn fabelojn al malgranda knabino Rigmor Stampe, kie gepatrojn li ofte vizitis. Rigmor Stampe en alta aĝo fariĝis esperantistino, ŝia filo Kay Bendix estis en 1908 la unua prezidanto de la Kopenhaga Esperanto – Klubo.

KON-TIKI EN SLOVAKA LINGVO – PER ESPERANTO. Venas en niajn manojn verko „Ekspedicio Kon-Tiki“ en slovakaj traduko de Eduard V. Tvarožek /Thor Heyerdahl: Kon – Tiki. Eldonejo Osveta, Martin 1955. Laŭ esperanta teksto eldonita de Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1951 tradukis Eduard V. Tvarožek./ Estas plezuro foliumi la libron, plenan de allogaj ilustraĵoj. Estas ĝojinda afero, ke tiu grandsignifa verko, kiu esploras la devenon de loĝantoj de la Pacifika insularo kaj tre verŝajne solvis tiun demandon definitive, fine aperas en nia lando, sed precipe ni salutas la peron pro la fakto, ke servis kiel bazo por la slovakaj traduko la Esperanto-teksto, konala al ni el la brila eldono de Stockholm. Ni des pli ĝojas pro tiu ledono, ĉar ĝia esperanta deveno neniel estas kaŝita, kio fariĝis bedaŭrinda kutimo ĉe niaj /gazetoj k.a./ eldonoj. Ni legas klare, ke la verko estis tradukita el teksto esperantlingva. Ni salutas tiun okazaĵon, en kiu Esperanto montriĝis denove kiel valora peranto de kulturaj valoroj. Estos interese rememori, ke estas dua verko el lingvo norvega, kiu estis en nia lando preparita laŭ Esperanto-teksto. La unua estas la libro „per aerŝipo al norda poluso“ de Odd Arnesen, eldonita en 1929 de Orbis. Ĝin tradukis tiam laŭ Esperanto-teksto O. Ĝinz. Kon-Tiki aĉetebla ĉe Slovenská kniha, Václavské nám., broŝurita Kčs 15,60, bandita Kčs 20,60. O. G.

--

LABORSEMINARIO DE ESPERANTISTOJ EN OSTRAVA estas aranĝata en la tagoj de 24.10. – 30.10.1955 en la kulturĉambroj de uzina klubo VŽKG, Ostrava 10 – Zámek. Laŭ prospekto prelegas s-anoj Janouš, Kočvara kaj Čermák el Ostrava, Rudolf kaj Dro Mohapl el Olomouc, Kořínek el Brno kaj Bendová el Praha. Fervojobato 50%. Aliĝu al s-ano Ladislav A d á m e k, Poruba u Ostravy, Hornická 304.

KURSOJ DE ESPERANTO ĈE OSVĚTOVÁ BESEDA 2. La 5an de oktobro komencis planitaj tutjaraj kursoj de Esperanto en tri sekcioj:

16 – 17,30a horo: por infanoj 8 – 15 jaraj. Gvidas s-anino E. Řiháčková
17,30 – 19a horo: por komencantoj – gvidas s-ano A. Slanina
19 – 20a horo: progresiga kurso – gvidas s-anino E. Suchardová.

Ĉiuj kursoj estas en la salono de nia klubejo en Smečky 26. La instruistoj estas salajrataj kiel instruistoj de ceteraj kursoj surbaze de normala laborkontrakto.

ESPERANTO disvastigas informojn pri soveta stenografio. En franca revue „La Vérité Sténographique“ /La stenografia Vero/, nroj 88-89, junio-septembro 1955, poj 31-33, aperis artikolo „La Sténographie en Union Soviétique“. Ĉe komenco de la artikolo estas akcentite, ke ĝi estis ricevita de esperantisto, jak ĉe la fino, ke la Esperanto-tradukon faris A. Staňura kaj la francan G. Provost. Unu ekzemplero de la revue kun la nomita artikolo estis sendita al prof. E. Bokarev ĉe Lingvistica Instituto en Moskvo kiel pruvo pri utileco de Esperanto, per kiu oni povas disvastigi informojn pri Sovet-Unio.

--

MALTAŬGA PROPAGANDO. Ni legas en ĉeĥa lernolibro de Esperanto – ne tre malnova la jenajn frazojn: Preskaŭ 20 000 Delegitoj de UEA en ĉiu pli granda urbo de kulturaj ŝtatoj..., preskaŭ ĉiuj radiostacioj de la mondo dissendas regule Esperanto-paroladojn kaj kursojn....jam hodiaŭ estas projekciataj en iuj landoj filmoj kun tekstoj ekskluzive esperantaj.... Ktp. Ni nepre malkonsilas similan neseriozan propagandon, kiun nia afero neniel bezonas.

--

A t e n t u ! NIKOLAA VESPERETO KAJ REGIONA KONFERENCO EN PRAHA.

La Esperanto-Junularo en Praha aranĝos sabate la 27-an de novembro 1955 en la palaco Blaník /Fénix/, Václavské nám. 56 Nikolaan vespereton, al kiu vi estas sincere invitataj! La eksterpahanojn ni atentigas, ke ili verŝajne sukcesos akiri fervojrabaton /demandu en Turista, n. p./ Aliĝojn kaj dezirojn pri loudo sendu al s. Vladimír Novotný /Polit. věžňů 10/ Praha 3 – Nové Město Restante. La komenco de la vespereto: 20-a horo. La sabata programo konstistas el du partoj: La unua estas dediĉita al kultura programo, kie nivelon garantias la jenaj nomoj:

Clara di Giuseppe Minarini /Italio/	- soprano
D-ro Pravoslav Sádlo	- violonĉelo
Jiří Knobloch	- gitaro
Leopold Firley	- baritono
Pavel Kvapil	- piano

Viajn event. kontribuojn al la programo antaŭe anoncu al s. Novotný. Je la fino de la kultura programo okazos disdono de donacoj, kiujn vi alportos por ĝojigi viajn geamikojn. Post 20-minuta paŭzo por amika interparolo kaj refreŝiĝo komenciĝos gaja danco, kiu estas la dua parto de la vespero. Ĝi daŭros ĝis la 1-a horo. Respektu la komencon de la programo precize je la 20-a horo! La fino estos jam je la unua horo, ĉar dimanĉon la 28-an de novembro okazos

REGIONA KONFERENCO DE ESPERANTO - JUNULARO, kiun partoprenos certe ĉiuj sabataj gastoj! Ĝia komenco estos precize je la 9-a horo kaj la programo jena:

Himno
Kultura programem
Salutoj de Jaroslav Šustr /EK Praha/ kaj de Josef Vitek /TKKE/
Kvaronjara resumo pri nia movado: s. Mařík
Parolas la regionaj delegitoj: s. Novotný, Křivánek, Franc, Hořejší k. a.
Aktualaj problemoj de nia laboro: s. Kuzník, Kočvara, Novobilský
Diskuto.

La rezultojn de la kunveno resumos kaj pritaksos la regiona delegito por Praha s. Novotný. La Esperanto-Junularo en Praha kore vin invitas al sia entrepreno kaj ĝi esperas, ke la preparita programo ĉiun kontentigos.

Ĝis la revido en Praha la 27-an de novembro!

JUNULARO EN PRAHA.

La Esperanto-Junularo en Praha kunvenas regule ĉiun mardon je la 19-a h. en Blindula Domo, Krakovská 21 /apud Václavské nám./ Ankaŭ vi venu por konatiĝi kun nia amika rondo kaj por trovi plaĉon en nia varia programo: du perfektigaj kursoj /lingvo, literaturo, historio/, aktualaj raportoj, kantado, ludoj ktp./ Se vi venos malfrue kaj la koridoro jam estas senluma, tamen eniru por trovi nin en la 3-a etaĝo, „Klubovna“./. Junularo Praha.

La postsomera 27-a nro de TAGIĜO, la centra cirkulero de la Esperanto-Junularo en ĈSR, aperis en impona vesto kun 10 presitaj paĝoj belguste ilustritaj. El ĝia tre riĉa kaj varia programo ni citas: ĉefartikolo de la ĉefdelegito „Kuraĝe antaŭen!“, raportaro pri: esp.renkontiĝo en Varsovio, Somera Esp. Tendaro, Junulara jarkunveno, sukcesoj de E. en USSR kaj popoldem. landoj, konsilioj pri ohavo de grupkunvenoj, traduk-konkurso, kanto de SET 1955 kun muziknotoj. Sekurigu al vi regulan liveradon per sendo /per poŝtmandato/ de Kĉs 8 por la tuta jaro al la redaktoro Jar. Kuzník, Rooseveltova 17, Opava. Varbu inter viaj amikoj por TAGIĜO! Artikoloj kaj raportoj plezure akceptataj.

LA AKTIVECO DE LA ELDONEJO STAFETA /Juan Régulo Péroz, Kanariaj insuloj/. La laŭdinda agado de la nomita eldonejo esperinde disvolviĝas. Post la aperigo de la originala poemaro KVAROPO kaj la dua libro LA BAPTO DE CARO VLADIMIR de nia Havlíček estis nun sinsekve eldonitaj du kolektoj de originalaj noveloj: EL LA MANIKO de Roto Rossetti, plena de ĉarmaj, spritaj kaj lingve instruaj epizodoj /eĉ du malgrandaj detektiv-romanoj!/ kaj KOKO KRIAS JAM de Ferenc Szilágyi, kun noveloj jen agrable bonhumoraj, jen preme seriozaj, sed ĉiam plenigitaj de homar kaj simpatio al la suferantoj.

Ni esperas, ke ankaŭ niaj samideanoj povos siatempe havigi al si por sia amuzo kaj instruo tiujn ĉi valorajn literaturaĵojn, kiuj -bedadaŭrinde- povas veni en niajn manojn nur rare kaj sporade.

Pu

LA MALPRUDENTA SCIVOLULO, novelo el la fama verko „Don-Kiĥoto“ de Cervantes en la traduko de Luis Hernandez estis ĵus eldonita en Valencia. La monfama staturo de la Genia Kavaliro Don Kiĥoto de la Manĉa revivas en niaj rememoroj ĉe la legado de tiu ĉi brile tradukita interesa kaj amuza novelo /kvankam Don Kiĥoto mem ne estas ĝia rolulo/. Estas ekzemplodona historio de ??? edzo, kiu volis praktike elprovi – pere de sia ĝentila amiko – ĝis kioma rado estas rezistema la virto de lia propra bela edzino.

Ekzemplero de tiu ĉi libro, donacita de la tradukinto, troviĝas nun en la biblioteko de nia Klubo.

H E L P U ! Distrikta komisiono por kolektado kaj kulturado de kuracvegetaĵoj ĉe ONV Dvůr Králové n. L. petas ĉeĥoslovakajn esperantistojn, ke ili peru al ĝi interŝanĝon de afiŝoj pri kuracvegetaĵoj kaj de eksterlandaj gazetoj pri kulturado de kuracvegetaĵoj. Adreso: Leopold Petera, Dvůr Králové n. L., poŝtkesto 55.

GRAVA ALVOKO AL GEINSTRUISTOJ-ESPERANTISTOJ. Universala Esperanto-Asocio, la centra organizo de la Esperanto movado preparas novajn gravajn paŝojn rilate instruadon de Esperanto en la lernejoj. Ni esperu, ke la situacio ŝanĝiĝos ĝis tiu grado, ke oni povos konsideri enkondukon ankaŭ en niaj lernejoj. Estas tial nia devo doni ĉiun argon al la klopodoj de UEA. Centro de Esploro kaj Dokumentado petas ĉiujn aktivajn aŭ emeritajn geinstruistojn kaj geprofesorojn, kiuj parolas Esperanton kaj kiuj instruas /is/ kiujn ajn objektojn en kiu ajn lernejo aŭ universitato de la mondo respondi, plej oportune per ordinara poŝtkarto, al jenaj demandoj: 1. lando, 2. urbo, 3. nomo, 4. adreso, 5. ĉu aktiva aŭ emerita, 6. nomo de la lernejo /nacilingve kaj Esperante/, en kiu vi instruas aŭ se emerita – laste instruis, 7. grado de tiu lernejo laŭ la leĝoj de via lando: ĉu elementa, mezgrada – liceo, gimnazio ktp. – aŭ altgrada – universitato aŭ samranga altlernejo, 8. objektoj, kiujn vi instruas, 9. ĉu vi estas preta, en okazo de bezono, instrui Esperanton en via lernejo aŭ en alia lernejo de via urbo aŭ loko?, 10. dato kaj subskribo. La respondon al la supraj demandoj bonvolu adresi al kunlaboranto de CED por lernejoj demandoj s-ano David Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop, Auckland, Co. Durham, Britujo.

Ni urĝe petas ĉiujn ĉeĥoslovakajn instruistojn, ke ili respondu tiun ĉi alvokon plej rapide, por ke ilia respondo alvenu ĝis fino de novembro al la notita adreso.

EKSKURSO FARIĜIS LABORKONFERENCO. La Esperantista Klubo Praha organizis la 25an de sept. aŭtobusan ekskurson al Karlovy Vary. La karavano el Praha nombris 33 personojn kaj bonege sukcesis. Bonan inicon montris denove la Junularo Praha, kiu atentigis siajn anojn en proksimo de Karlovy Vary pri la entrepreno kaj invitis ilin al rendezuo. Fakte kunvenis ĉe tiu okazo pli ol 60 gesamideanoj el 12 lokoj: Aš, Karlovy Vary, Kladno, Most, Nová Role, Nýřany, Ostrava, Pernštejn, Plzeň, Praha, Stará Role. Vere samideana akcepto atendis ilin. La samideanoj de K. V. preparis ne nur florbukedon por la bonvenigo, sed ankaŭ bonegajn maten- kaj tagmanĝon por prezo fabele malalta, pro kio specialan dankon meritas ges-anoj Hanyš kaj Horák. La ceteran programon /vizitan de fontoj kaj rigardejoj/ zorgeme organizis s-ano PhMr. Věra Škrvnová. Ĉiuj tre ĝojis revidi la ĉiam vigan Dron Vaněk, nian honorindan malnovan pioniron, kiu montriĝis elokventa oratoro kaj kapabla deklamanto. Posttagmeze improvizis Dro T. Pumpr tre instruan valoran prelegon pri Esperanta poezio kun multaj ekzemploj. Tion varme aplaudis precipe eksterprahaaj gejunuloj, kiuj havas nur maloftan okazon renkonti kaj aŭdi eminentan Esperanto-poeton. La samo posttagmeza laborkunveno fariĝis fondo de nova Junulara grupo de K. V. Oni planis kursojn, propagandon, regulajn kunvenojn, novajn kontaktojn. La gejunuloj ol aliaj lokoj forportis por sia laboro taŭgan ekzemplon, abundan inicon, utilajn sugestojn kaj konsilojn. Dankon meritas ankaŭ la disciplino de la ekskursintoj el Praha, kiuj venis al la aŭtobuso tre punktuale, kvankam temis pri tre frua matenhoru. Ripeto de simila entrepreno estas nepre rekomendinda, jam diskutanta kaj preparata.

- - -

ŽĎÁR NAD SÁZAVOU. La Esperanto-kurso, kiun gvidis s-ano Březina, finiĝis en junio per fondo de Esperanto-grupo ĉe Osvětová Beseda. Ĉiuj kursanoj jam vigle interkorespondas kun eksterlandaj s-anoj. Oni aranĝis publikan ekspozicion por varbi novajn kursanojn aŭtune. Sekve de nova traktado inter s-ano Březina kaj la aŭtoritatoj, la Distrikta Nacia Komitato favoras nun eĉ pli tiun ĉi porpacan laboron kaj plilis sian ĝisnunan subtenon per tio, ke de nun ĝia kultura komisiono ne nur pagos la koston pro organizado de la kursem senpage disponigita, sed ankaŭ la necesajn lernhelpilojn. La novajn, aŭtunajn kursojn oni inaŭguris per prelego de s-ano Echtner el Praha la 17an de sept. La malfermon ĉeestis 40 p., kio estas nombro sufiĉa konsiderante, ke la urbo ne estas granda. Okazas tri kursoj: unu por infano komencantoj, la dua por maturuloj-komencantoj, la tria estas konversacia. La spirito, kiu regas inter la novaj kaj malnovaj adeptoj, estas vere samideana, eĉ kortuŝa. Ĉiuj konkuras pri entuziasmo kaj servado al amata afero.

- - -

En NÁCHOD kaj en RUMBURK vidis s-o P. el Tábor bele aranĝitajn propagandajn ekspozicietojn en la montrofenestroj. Lia koro ree ekbrulis por bela ideo de internacia lingvo, iel plej bela ideo de paco. Revekigis en li malnova sopko fariĝi esperantisto, studi tiun mirindan ilon de internacia interkomprenigado. Li tre facile trovis nin en Praha, ricevis necesajn informojn kaj klariĝojn, aĉetis lernolibrojn kaj vortarojn, kaj pligrandigis niajn vicojn. Samideanoj en Rumburk kaj en Náchod eblen ne scias, ke modela ilia laboro alportas fruktojn eĉ malproksime de iliaj lokoj. Ili meritas nian elkoran dankon kaj imiton de ilia ekzemplo!

EK Praha

Laŭbezone eldonas Esperantista Klubo ĉe Osvětová beseda en Praha 2.
Koresponda adreso: Jaroslav Š u s t , Dlouhá tř. 10, Praha 1.